

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1989 - 4

(OKTOBRO - NOVEMBRO - DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la Eŭro-horloĝo



... Kaj la Templanoj

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Pantagruelo en Gresillon	3-4
La enigmo de la Templanoj (S. Boniol)	5-7
La Eŭro-horloĝo (G.F. Makkink)	8-9
Universalismo en la Revolucio (F. Boyet)	10-12
Paĝo de la geknaboj (Audrey)	13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

La raporto aperanta sur paĝoj 15 kaj 16 de tiu-ĉi numero de Kulturaj Kajeroj montras la postsomeran situacion de la Esperanto-Domo. Denove la staĝoj estis sukcesaj...kiel kutime. La financa stato estas bona. La disponeblaj financoj ebligos la refaron de la lastaj du salonoj ankoraŭ ne tuŝitaj: biblioteko kaj oficejo. La "afero Gresillon" bonfartas kaj ĉiuj respondeculoj rajtas ĝoji.

Tamen, nigra punkto daŭre montriĝas. Kiuj estas pretaj efektive helpi en la gvidlaboro? La nova prezidanto ne povas ĉion fari sola. La helpantoj ne estas sufiĉe multaj por la dumjara laboro kaj ankaŭ por la staĝoj. Oni ĉiam vidas la samajn nomojn. Promesoj venas...kaj restas promesoj. Ĉiuj amikoj de la Esperanto-Domo diras, ke tiu "kreaĵo" estas mirinda. Multfoje estas uzata la esprimo "nia domo". Sed admiro ne sufiĉas por la pluvivigo de Gresillon. Novaj, pliaj aŭ anstataŭaj, fortoj devas partopreni. Ni jam skribis, ke mankas la homoj, ne la mono. Tiu situacio bedaŭrinde daŭras. La energio de la esperantistoj montriĝas en multaj lokoj, kelkfoje dispeciĝe. Tamen geamikoj certe kapablas helpi sed ili ne proponas sin. Kial? Se ne pro manko de energio kaj kapablo, ĉu pro manko de mem-fido? La unuaj kaj la nunaj respondeculoj tute ne estis speciale kapablaj; ili nur iom post iom "kapabliĝis". Ili ne estas apartaj homoj. Tre verŝajne multaj aliaj povus fari, kion ili faras. Ni atendas iliajn proponojn.

La okazo prezentiĝos baldaŭ. En 1990 la duono de la komitato (ses postenoj) estos laŭstatute renovigataj. Kandidatiĝu por helpi nin, por ke pluvivu "nia Domo".

Esperanto tra la Mondo

SAT-KONGRESO 1989- Ĝi okazis en Illertissen (Bavarujo) kun 260 partoprenantoj el 31 landoj. Ĝi estis aparte tutmondeca. La nova Sovetrespublikara Esperantista Unio sendis estraranon. Okazis interesaj fakaj prelegoj kaj kulturaj aranĝoj el kiuj rokkoncerto. La venontjara SAT-Kongreso (63-a) okazos en Linz, Aŭstrio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1990.

LA U.K. EN HAVANO PREPARIĜAS- Por tiu universala kongreso, 14-a ĝis 21-a de julio 1990, la reĝisoro de la kongresa temo "Esperanto, evoluo, kultura diverseco" estos d-rino Jane Edwards, etnologo usona. La registaraj instancoj en Kubo jam decidis eldoni almenaŭ unu specialan poŝtmarkon omaĝe al la U.K., La Tago de la Lernejo okazos la 17-an de julio, en la kadro de la kongreso, kun la temo:"Naciaĵoj kaj internaciaĵoj en esperanta lernomaterialo". La instruistara faka asocio ILEI gvidos la internaciajn ekzamenojn.

LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO okazos post la U.K., de la 21-a ĝis la 28-a de julio, en Playa Girón, je 220 km. for de Havano.

EL FRANCIO- La 16an kaj 17an de marto 1990 okazos SAT-semajnfino en la kastelo de Pocé-sur-Cissé, 3 km. distance de Amboise. Por nur 160 f. vi iĝos kastelanoj kaj povos elekti inter diversaj okupadoj. Petu informojn ĉe Marc Noulin, Les Monts, 41360-Lunay.

La regiona gazeto "La Nouvelle République" organizis konkurson, antaŭ kelkaj monatoj, inter siaj legantoj, por ricevi "ideojn" pri estonta Eŭropo. La unuan premion ricevis leganto, kiu skribis:" La eŭropanoj estos dulingvaj; kial ne instrui al ili esperanton?"

PRI FAKA TRADUKADO- La komputila traduksistemo DLT bezonos ampleksan kolekton de fakaj tekstoj en etna lingvo paralele kun altnivela traduko al esperanto. Lige al tiu bezono, DLT deziras kuraĝigi la kapablon traduki al kaj el esperanto. Kurso traktos senkomputilan, percerban, surpaperan tradukadon de ne-beletraj tekstoj. La kurso okazos, de la 18-a ĝia la 21-a de januaro 1990 en Kultura Centro esperantista, Pf.779,CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

NOVAJ ESPERANTO-ASOCIOJ-
-Singapura Esperanto-Asocio,c/o 372 East Coast Road, 1542 Singapuro.
-Malajzia Esperanto-Asocio, Zainuddin Zakaria, suite 147, the Merlin, 2,Jalan Sultan Ismail,50525 Kuala Lumpur, Malajzia.
-S-ro Gamvir Man Shresta, PO Box 4033, Kathmandu, Nepalo.
-Unuiĝo Togolanda por Esperanto, B.P. 13169, Lomé, Togolando.
-Duala Esperanto-Grupo, B.P. 7407, Douala Bassa, Kamerunio.

EL SOVETUNIO- Dum la lasta universala kongreso, Sovetrespublikara Esperantista Unio kaj la sendependaj asocioj de Latvio kaj Litovio aliĝis al UEA. Estis ankaŭ anoncita la kreado de movado por tutunuigo de la Esperanto-kluboj, de junularaj grupoj, asociiĝo de esperanto-kooperativoj, k.t.p.

EL KOREIO- Pli ol 350 esperantistoj el la tuta lando ĉeestis la 21-an korean kongreson de esperanto.
-Komence de oktobro okazis korea-japana junulara renkontiĝo en Seulo, kun 140 partoprenantoj.
Se vi deziras korespondi kun koreaj esperantistoj, sendu peton al: Korea Esperanto-Asocio por koresponda servo, C.P.O. Kestos 4258, Seulo, 100-642, Koreio.

KUNORDIGA KOMITATO DE INTERLINGVISTOJ-
Adreso: D-ro sc. Sergej N. Kuznetsov, Instituto pri lingvistiko, Sovetia Akademio de Sciencoj, Semashko 1/12, SU-103009 Moskvo.

Kiel Pantagruelo venis al Grezijono por peti helpon

Anonima manuskripto trovita en anguio
de la Grezijona biblioteko

Tiam ni alvenis en Anĝevon, kie la somero estis varma; tamen ne regis soifo, ĉar ĝi estas regiono de grandaj kaj bone provizitaj keloj. Tial neniam regas sekeco de gorĝo, kiu estas tre ĝena malsano. Ĉe Anĝevo Pantagruelo, por amuzi sin, fosis per du fingroj fosaĵon ĉirkaŭ la turoj de la kastelo, kaj tie nun promenas cervoj por la plezuro de la apudloĝantoj. Ni rapide foriris al Baugé, ĉar Pantagruelo havis fidelajn aliancanojn en apuda kastelo nomata Grezijono. Tie regas grafo Pafiano, kiu gvidas roton el valoraj kaj bravaj kavaliroj, sub emblemo de verda stelo; tial oni nomas ilin " kavaliroj de la verda stelo". Ili estas viroj kaj virinoj kaj vivas en bona harmonio.

Ili akceptis nin afable kaj entuziasme; tuj portis grandan amason da glasoj kaj boteloj, kaj por mia sinjoro grandan pokalon, kiun ili speciale faris esperante nian viziton. Tiu pokalo nun staras en la granda ŝtuparo de la kastelo. Ĉar glaso estas tiel ridinda ujo, kiel por ni fingringo por bebo. La Grezijonanoj samtempe malfermis multajn barelojn da blanka kaj ruĝa vino, kaj ekkantis sonore: "Plenigu la glason ho ĉiu bonul'"... vi scias la ceteron de la kanzono. Grafo Pafiano bonvenigis kaj gratulis nian majstron per plataj, afablaj, poluritaj, ĝentilaj, plezurigaj vortoj; sed la septembra kaĉo tiel konfuzigis nian spiriton, ke mi ne povas redoni eĉ la komencon de unu. Ni ankoraŭ sentis la ĉarmon de liaj paroloj, kiam Pantagruelo, per milda voĉo, kiu tamen sonis kiel tondro, dankis nian gaston pro lia malavara akcepto kaj donacis al li memoraĵon. Li diris:" Fidoplena gasto, kaj vi bravaj kavaliroj, kiel profunde mi bedaŭras, ke mia vizito okazas en tiaj cirkonstancoj, kaj ke mi tiel mallonge povos ĝui restadon en via belega bieno. Mi venis por peti vian lojalan helpon en la milito, kiun la Dipsodoj trudis al mi. Vi scias, kiel kontraŭvole mi marŝas al batalo, kaj ke mi domaĝas la suferon de multaj homoj tiel stulte oferataj al la ambicioj de sensentaj estroj. Sed mia popolo jam suferis grandan ĝenon pro la invado de la Dipsodoj, kaj mi devas ilin helpi en bezono; Tial mi venis al vi, miaj lojaluloj, por peti vian spertan helpon en tiu danĝera entrepreno, tro bedaŭrante tamen la sangon, kiu elverŝiĝos je la okazo". Grafo Pafiano respondis tuj, ke lia tuta korpuso, kaj li mem, korpe kaj anime, estas pretaj helpi Sian Sinjoron kaj promenigi la verdan stelon en la plej varmajn lokojn de l'batalo. Li aldonis, ke ĉiuj kavaliroj estas nun tute pretaj por belaj kaj grandaj faroj. Ĉar ili ĵus revenis de ekspedicio kontraŭ la Atistoj, kiuj antaŭnelonge misplugis la kampojn de Esperantujo. Je tio hurais la tuta grupo kaj glasoj plu kuris, ĉar ĉiuj sentis tre grandan soifon post la parolado de Pantagruelo. Sed antaŭ ol pretigi sin por ekmarŝi kontraŭ la malamiko, ili invitis nin al granda bankedo kaj tuj estis la grandaj tabloj starigitaj.

"Mi trovas tiel strange, subite diris Panurĝo, ke tiuj graciaj, belaj, inde inecaj Grezijonaninoj miksiĝas kun ni, sidas ĉe ni, partoprenas en ĉiuj laboroj viraj je egaleca nivelo". "Tio, respondis Pantagruelo, memorigas min pri la kreaĵo de mia glora patro ĉe Telemo; li volis, ke ĉiuj viroj kaj virinoj libere kaj bonmore kunvivu kaj mi kredas vidi tie-ĉi alian ekzempleron de tiu bela fondaĵo". "Ĉu vi scias, diris Panurĝo, kiu mambesto, en unu ulo, kunigas ambaŭ seksojn?" "Mi tute ne vidas la rilaton, amiko Panurĝo, kaj cetere ne scias la respondon pri via enigmo, respondis Epistemo". "Trinku grandan glason da tiu Muskadet, kaj ne forgesu ĉi-tiun belan ŝinkon. Ĝi estas incitilo bonvena. Ĉu vi nun vidas solvon, eltiraĵon, respondon por la enigmo?" " Mia menso, respondis Epistemo, estas nek klara, nek klera pri

Ĉi-tiu ĉapitro. Donu da klarigo pli en mian glason...mi volas diri klarvino. Ha nun mi vidas, nun mi komprenas, nun mi estas ravita. Ĝi estas ja gepardo, klare, kiel pipsuko!" Dum tiuj afablaj diskutadoj, pasis manĝaĵoj pli bonaj unuj ol la aliaj. Jen trutoj, jen ezokoj, jen perkoj, jen perĉoj, jen gobioj, jen salmoj, jen angiloj, jen alozoj, jen gurnardoj, jen trigloj, jen skorpenoj, jen kobitidoj, jen lojtoj, jen skombroj, jen merlangoj, jen merlučoj, jen moruoj, jen gadoj, jen tinusoj, jen ekinoj, jen ostroj, jen mituloj, jen omaroj, jen palinuroj, jen langustoj, jen salikokoj, jen kraboj, kaj ĉe ĉio prezentiĝis barele vinoj de Muskadet, dikplanta de Nantes, de Pouilly, de Fuisse, de Graves, de Saumur, kaj multaj aliaj lokoj. Trinkaĵo mankis al neniu.

Tiam oni alportis viandaĵojn el: cervo, cervido, boaco, kapreolo, damao, tragelafo, sovaĝa porko, bredporko, ŝafo, ŝafido, bovo kamarga, bovido, leporo, kuniklo, koko, kokido, ĉevalo (sed kelkaj tion ne ŝatis), numido, fazano, meleagro, galinulo, tetrao, tetrako, glareolo, turdo, kolombo, jen stufitaj, jen frititaj, jen risolitaj, jen rostitaj, jen kradumitaj, jen raguaj, kun saŭcoj mustarda, burgunda, krema, cepa, funga, roberta, aŭrora,bearna, holanda, angla kaj pli amuzaj kaj agrablaj kombinaĵoj. Kaj estis servataj samtempe legomoj en senfina varieco.

Kaj tiam ĉiuj ĉe la tablo fervore mordis,rodis, maĉis, rojnis, detiris, ronĝis, fosis, varpis, tranĉis, voris, hakis, vipis, tiris, vomis, ŝtopis (la ventrajn truojn), kraĉis, reprenis saŭcon, raspis, tusis, tordis, grumblis, lekis, grimacis, viŝis, rompis la ostojn kaj de tie medolon forglutis, ŝprucis, ruktis, kaj ĉefe trinkis ade vinojn el Mâcon, Beaune, Bourgueil, Vougeot, Chorey, Morgon, Julienas, Montrachet, Saint-Amour, Poligny, Romanée, Vosne kaj multaj aliaj. Kaj estis bela spektaklo de la moviĝantaj mandibloj.

Post la viandoj venis la fromaĝoj: kamembertoj, furmoj, tomeoj, briaĵoj, kantalaĵoj, grujeraĵoj, Avesnaj buletoj, kaprinfromaĝoj, pipritaj, herbumitaj kaj...ree vinoj.

Kaj tiam venis kukoj, tortoj, klafutoj, pudingoj, flanoj kun vinoj el Bergerac, Montbazillac, Sauternes, Graves, Loire, Layon; estis granda ĝojo kaj vorado. Tiam serviĝis likvoroj kaj brandoj, verbenaj, konjakaj, juniperaj, prunaj, grenaj, prunelaj, ĝino, viskio, tiel, ke el ĉies buŝoj oni povis fari grandan flamon, kaj estis mirinda ĝojo.



Kiam ne plu estis timo pro ventrofaldo - kio estas terura kaj kripliga malsano - la ĉeestantoj komencis siajn ludojn. Ili konas nur unu, tio estas fiko. Sed ili eltrovis mirindan nombron da variaĵoj nome: efiko, reefiko, trafiko, mistifiko, pacifiko, fikolego k.a., kaj tiel finiĝis la vespero. Ni ricevis niajn litojn, krom Pantagruelo, kiu estis tro granda por dormi en la kastelo kaj devis ripozi ekstere. Ni ĉiuj dormis bone, krom Pantagruelo, kiu pro la pezo de sia korpo formis grandan truon, kiun tuj invadis la akvo; kaj ju pli li puŝis sin, des pli grandan lagon li formis; tiel, ke li fine ekstaris, kaj vidis, ke li, en kelkaj horoj, formis rondan lageton. Li degratis iom da tero apude por fari insulon. En la apuda truo sin banas nun la grezijonanoj.

La enigmo de la Templanoj

"La kavaliro de Kristo laŭkonscience mortigas kaj mortas en paco. Mortante li sin savas. Martigante, por Kristo li laboras. Morton suferi aŭ porti nome de Kristo, unuaflanke ja ne estas krimo, duaflanke meritas plenplenon da gloro. Certe ne mortigendaj estus la paganoj, se ekzistus alia rimedo por haltigi ilian invademon kaj malhelpi, ke ili subpremadu la kristanojn; sed en la nunaj cirkonstancoj, pli bone ilin buĉadi, ol riski, ke la justuloj subfalu en maljustaĵojn. Sin armi estas permesite almenaŭ al tiuj, kiuj estas komisiitaj de la Ĉielo kaj ne promesis vivi pli perfektan vivon...

"Mi volas, ke oni klare vidu la diferencon inter la sekularaj soldatoj kaj tiuj de Dio. Ne mankas disciplino ĉe tiuj ĉi. Ili komune kunvivadas, en ĝojo kaj modero, sen inoj kaj infanoj. Kaj por ke estu plenumata la anĝela perfekteco, ĉiuj loĝas en la sama domo, sen ia ajn persona havaĵo. Ili strebas konservi inter si la saman spiriton en paco kaj bonfarado...

"Inter ili, ne prefero pri persono: laŭmerite oni taksas, ne laŭ nobela naskiĝo. Ili respektas unu la alian por observi la kristan leĝon kaj reciprokas siajn ŝarĝojn. Kiam sonas la milit-horo, ili sin garnas interne per kredo, ekstere per fero. Mi ne scias ĉu oni devas ilin titoli kavaliroj aŭ monaĥoj. Mi opinias, ke konvenas, ke per ambaŭ nomoj samtempe oni ilin titolu, ĉar al ili mankas nek la monaĥa mildeco, nek la soldata kuraĝo...

"Kia dumviva sekureco, kiam sentime oni atendas la morton; sed eĉ kiom pli, kiam oni al ĝi sopiras, kiel al feliĉaĵo kaj ĝin ricevas kun pieco!" (Eltiraĵo el la "Laŭdo al la nova milico" de Sankta Bernardo).

****

En 1099 sur la kalvaria loko la krucmilitistoj trovis plurajn monumentojn. Tie Godfredo el Bouillon starigis dudek kanonikojn de "la Sankta Sepulkro" laŭnome, blankan mantelon kun ruĝa kruco surhavantajn. Post la morto de Godfredo estis fondita la ordeno de Sankta Johano de Jerusalemo, hospica ordeno (nigraj manteloj kun blankaj krucoj). Du jarojn poste venis la Fratuloj de Sankta Maria, teŭtona ordeno plej grandparte germandevena.

En 1118 la "povraj kavaliroj de Kristo" sin dediĉis al defendado de la pilgrimantoj kontraŭ la rabistoj kaj konsistigis la kavaliraron de la nova reĝo de Jerusalemo. La "povraj kavaliroj" obeis la regularon de la sanktasepulkranoj, sed sin laike vestis. Naŭ estis ili. Propran preĝejon ili ne havis. Tial la kanonikoj de l'Templo (Templo de Salomono) donis terenon al ilijen la deveno de ilia nomo.

Sankta Bernardo (kiu legis la Noblan Koranon laŭ latina tradukaĵo kaj mallongigitajn vivon kaj historion de Mahometo) deziris kavaliraron malfermitan al la kampuloj; tial grandan rolon li ludis ĉe la Templanoj, kies regularon li prilaboris. Dum la unuaj naŭ jaroj ĉi lastaj nek varbis, nek multe militis. Nur depost 1127 grandskala varbado komenciĝos. La plej gravaj altranguloj rezignos pri monduma vivmaniero por eniri la templan ordenon. En 1133 Alfonso el Aragono al ĝi testamentos unu trionon de siaj ŝtatoj. Duarangaj kastiliaj kaj aragonaj ordenoj kunfandiĝos kun ĝi. Neniam ia ajn kavalira ordeno levis similan fervoron.

En 1096 en Konstantinoplo (investita de la krucmilitistoj), okazis kvazaŭa konjunkcio, ĉar tie renkontiĝis kristanaj kaj islamaj inicitoj. Estis metitaj la bazoj de tio, kio fariĝos en Jerusalemo, en 1118, la templa ordeno, kun la enoficigo de la Patriarko, 67a posteulo de Johano la apostolo. En 1127 ĝi disvolviĝados kun la helpo de Sankta Bernardo. La tekston de la drasta regularo, oni trovis

en Parizo (1610). Se ekzistis sekreta regularo, kiel jam asertite, nur buŝe ĝi estis transdonata kaj nenian spuron pri ĝi la arkivoj liveris.

La ordeno konsistis el kavaliroj, kapelestroj, ŝildistoj, servistoj kaj manlaboristoj. Eble kelkaj virinoj helpis en hospico-prizorgado, sed sub la sama regularo. La superega aŭtoritato estis la ĉefmajstro; tamen limigita estis lia decidpovo koncerne la alproprigon de havaĵoj, la akcepton de nova frato aŭ la starigon de militpaŭzo. Nemalhavebla estis ankaŭ la kanonikara interkonsento por la nomumado de la provincaj komandoroj. Post la ĉefmajstro venis la seneskalo, la marŝalo kaj la komandoroj.

MATERIALA POTENCO- Komence de la XII-a jarcento la ordeno kalkulas feŭdojn en Normandio (tie, en Gisors finiĝos nia esploro), Kastilio. Langvedoko, Romo, Germanio... Oro alfluadas. Kiu eniras la ordenon, tiu ĝin favoras per plejparto el siaj havaĵoj. De 1147 ekzistas templa komandorejo en Parizo. En 1170 Ludoviko la sepa allasas al ĝi vastan marĉan terenon. En 1212 la turo estas konstruita. Trionon de la pariza civito okupas la templa ĉirkaŭbaritejo, ĉefloko de ia eŭropa imperio de Irlando al Grekujo etendiĝanta. Krom la papo neniu ĝuas kontrolrajton; do, vera ŝtato ene de la ŝtato mem. Eĉ la religia vivo de la templanoj estas sendependa: ili havas siajn klerikaron, preĝejojn, tombejojn, kie ili enterigas eĉ nobelojn de la papo ekskomunikitajn. Nek milita devo, nek impostopago al la reĝo. La ununura malpermeso: translasi la ordenajn havaĵojn. Konstantaj aĉetistoj, neniam vendistoj kun enspezaro, kiu egalvalorus kelkdekon de niaj nuntempaj miliardoj: jen la templanoj. Kun potenca ŝiparo, el koloniiga potenco ili fariĝas kontinentaj. Ĉu ili ne aŭdacis diri al Henriko la tria el Anglujo: "tiom longe, kiom vi estados justa, vi reĝados".

Oni kutime opinias, ke la anstataŭigo de la likida mono per papermono estas juda eltrovaĵo. Tute ne: templana ĝi estas. La princoj, burĝoj, negocistoj deponas sian kapitalon ĉe tiuj novtipaj bankistoj kaj okaze de vojaĝoj, ĉu enlandaj, ĉu pli bone eksterlanden, ili ne estos devigataj riski survojan priŝteladon: ili traktos kaj ricevos la respondajn sumojn en la plej proksima komandorejo. La ordena siglo estas la plej alte taksata garantiaĵo. Post la krucmilitoj la templanoj survoje sekurigas la vojaĝantojn, la pligrimantojn, eĉ la brutaron kaj necesan provizadon por difinita regiono. Ili malpermesas uzuron, sed profitas per la reĝaj devalutoj kaj montriĝas laŭcirkonstance altigistoj aŭ malaltigistoj. Oni eĉ parolis pri interna mono kaj sekreta lingvo-kodo. Ĉiuokaze ilia internacieco donas al ili netakseblan forton.

SPIRITA IDEALO- Dum la fama proceso kelkaj kulpigitoj diris, ke ekzistas regulo tiel sekreta, ke nenio povus malhelpi, ke ili mortigu la unuan ĝin malkovrantan, eĉ se temus pri la papo mem aŭ la reĝo de Francujo. Jen teruraj dirаĵoj en la buŝoj de diaj milicanoj!

Por ekkompreni ilian pensmanieron oni devas reatingi la tempon de la eklezia fondiĝo. En Oriento oni estis tiom profunde konvinkita, ke estis apartigende el la ŝafaro de la kredantoj, ke estis deĉifrende la vera senco de la Sanktaj Skriboj, ke necesis, ke inicon oni ricevu por sin levi ĝis Dio, ke ĉe ambaŭ judoj kaj kristanoj gnostiko malvolviĝis, kies komuna trajto estis la jena: kredon kaj agadon superas elkono kaj pere de ekstazo la homo povas reatingi la verajn fontojn de l'saĝo. Dum la XII-a jarcento la sanktasepulkraj kanonikoj estis la gardantoj de la esenaj doktrinoj, kiujn ili transdonis al la templanoj. Ĉu sankta Klemento el Aleksandrio ne deklaris, ke samrange, kiel la Sanktaj Skriboj gnostiko estas manifesto de la Dia Vorto? En Palestino ekzistis johandevena eklezio, kiu kultis la profeton Johano-Baptisto kaj Johanon la evangeliisto.

Laŭ ili la vera ekleziestro estis ne Petro sed Johano. Ili estis la gardistoj de la esoteraj doktrinoj, dum la petra eklezio disvastigis ekzoteran instruadon al popolamaso destinitan.

Post tiu historia rememorigo ni pli facile enpenetros la religiajn kutimojn de la templanoj. Ili kutimas preĝadi laŭ la jenaj vortoj: "Nia Sinjorino estadis komence de niaj vivo kaj religio; en ŝi kaj ŝiahonore -se tiel al Dio plaĉas- estos fino al niaj vivoj." Fermentilo estas la templanoj por la okcidenta civilizo; ĉiea ilia agado, kaj oriente kaj okcidente. Tial por nur tro mallonga tempo ekvilibro ekstariĝas. Laŭ la modelo de la ĉiela civito, konstrui la teran: jen celo de tiuj vivaj simboloj de ĉiela milico.

Plej imitinda estas ilia bonfaremo. Antaŭ la plej solenaj festoj ili disdonadas al la mizeruloj panbulojn po miloj da tunoj. Malavare ili provizas la kriplulojn per mono. Dum la neimageblaj malabundegoj (tiam la kamparanoj fantomeske vagadis, ronĝante radikojn kaj pistante miksaĵon el arboŝeloj kaj ostoj el eltombigitoj), ili disdonas, foje en unu tago almozojn al pli ol dekmil senhavuloj. Ĉie sur siaj eŭropaj naŭmil komandorejoj la samajn gestojn ili ripetadas. Kvankam kulpigitaj pro gnostiko ili apartenas al la eklezio de Petro fondita -tamen ankaŭ al tiu de Johano kaj donas neoficialan instruadon, nur buŝan. Tio evidentiĝas en multaj tekstoj de la proceso kaj laŭ la rakontoj de la samtempuloj. Pensindas, ke trans la eksteraj ritoj kaj agado ekzistis sekretaj instruado kaj ritoj al la malplimulto destinitaj, dum tute nescia estis la plimulto pri ĉio ĉi tio. Oficiale la ordeno propagandas socialajn kaj politikajn ideojn sur solidareco kaj metifrataroj baziĝantajn; sed tra la tuta agado profiliĝas ia esoterismo, vera movigilo de la tutmonda agado. Supozeble ekzistis sekreta hierarkio sine de la ordeno: multaj signoj firmigas hipotezon tiaspecan. Blanke vestitaj, samkiel la pitagoraj disĉiploj, la templanoj emfazas la gravecon de la nombroj, samkiel iliaj helenaj antaŭuloj. Trianguloj, simboloj de la Triunuo, ofte aperas en la figuroj. Multaj preĝejoj montras oklateran planon. La nombro tri estas aparte atentata: trifoje la kandidato prezentiĝas; trifoje tage ili manĝas kaj trifoje semajne ili ricevas viandon; trifoje jare severegan faston ili observas; trifoje ili komuniiĝas okaze de trifoja krucadorado; trifoje semajne ili ankaŭ almozdonas. Tri ĉevalojn havas ĉiu monaĥo kaj devigata li estas ne rifuzi lukton kontraŭ triopo da malamikoj. Pri la nombro naŭ, signo de plenumado: en 1118 naŭ fratoj ĝis 1127 (do naŭ jaroj). Naŭ provincojn inkluzivas la ordeno. Ĉiumatene ili diras Patronian po 13 kaj dumvespere po 9. La koncilion, kiu difinis la regularon ĉeestis 13 episkopoj kaj ĉefepiskopoj. El 22, 13 ĉefmajstroj oferis sian vivon.

La ĉefa festo estas nek Kristnasko, nek Pasko, sed Pentekosto, ĉar ili estas apostoloj de la kristanaro. Gravas ankaŭ la dimanĉo al la Triunuo dediĉita. La 24-an de junio Johano-Baptisto estas solenata.

Krom la religiaj praktikoj, el ĉiufaka homa sperto ili faras sintezon. Ilia ŝiparo trakuras la marojn. Eble fine de la XIII-a jarcento ili la unuaj koloniigis Meksikion. Povas esti, ke Kristoforo Kolumbo dank'al ili ricevis dokumentojn por sia ŝipirado al Nova Mondo. Li estus nur daŭriginta jam komencitan entreprenon. En arkitekturo, kvankam apartan stilon ili ne havas, ili antaŭenigas la gotikan kaj flegas oftajn rilatojn kun la metifrataroj kaj majstroj. Sed ilia supera celo estas homperfektigo. Nur per amo oni akiras la elkonon. Vanas malamo. Ili volus trudi universalan pacon ĝis la homoj estos sufiĉe maturaj por kapabli sian propran renovigon. Danto laŭdis la templanojn egale kun la Amo, kiu movas la sunon kaj stelojn. La kristanaron ili ne perfidis, ĉar ekvilibron ili strebis inter Oriento kaj Okcidento. Sed tro frua estis ilia plano naski spiritan kunvivadon kaj politikan unuecon inter la eŭropaj ŝtatoj, en kunsento kun la papo kaj reĝo de Francujo. Subaĉetebla estis la unua, senlime ambicia la dua.

Ş. BONIOL

La Eŭro-horloĝo

Oni povas facile pligrandigi la industrian produktadon kaj plialtigi la spiritajn ĝuojn el liberaj horoj sen speciala penado. Tio sonas kiel nekredeblaĵo, sed mag. d-ro George van den Bergh, profesoro ĉe la Amsterdama universitato, montras la vojon al tio en malgranda libro, kies tria eldono aperis en 1957 sub la titolo "Euro-klok" (Eŭro-horloĝo). La ideo estas tiel grandioza, ke la enhavo de la libro meritas internacian konigon. Tiom pli, ĉar la ideo estas realigebla nur sur internacia bazo almenaŭ sur Eŭropa.

La kerna ideo estas, ke la homoj de la moderna socio fordormas valorajn horojn de la tago, kiam la suno lumas kaj la naturo estas freŝa. Ili ĝuas siajn liberajn horojn grandparte post la sunsubiro ĉe farita lumo. Tiel ili malhavas la vigligan instigon de la malvarmetaj matenhoroj en la somero, dum ili samtempe elspezas monon por ricevi elektron necesan por lumigi la vesperon. Kiel ŝanĝi tion? En multaj landoj oni iam enkondukis la somertempon, fruigante la horloĝojn en la komenco de la somero per unu horo, kaj malfruigante ilin en la fino de la somero per la sama tempokvanto. Tiu manipulado ne kontentigas ĉies dezirojn, ĉar ekzemple por la farmistoj la subitaj temposaltoj du fojojn en la jaro havas diversajn malagrablajn sekvojn.

Prof.van den Bergh trovis alian solvon por forigi la ĝenojn de la somertempa aranĝo. Li proponas nun iom-post-ioman, kvazaŭ glitan ŝanĝon de la tempindiko, adaptante la rapidecon de la horloĝoj dufoje en la jaro: de la 21-a de junio (horo 12) ĝis la 21-a de decembro (horo 0) la horloĝoj devos iri iom malpli rapide ol nun; de la 21-a de decembro (horo 0) ĝis la 21-a de junio (horo 12) la horloĝoj devos iri iom pli rapide. Tiuj ŝanĝoj estas facile atingeblaj, se oni iomete ŝovas la regulilon de la horloĝo du fojojn en la jaro, en unu kaj la alia direkto. Temas pri fruiĝo respektive malfruiĝo de nur 50 sekundoj en ĉiu tago. En la unua eldono de lia libro "Klokhervorming" (Horloĝreformo) la propono koncernis nur Nederlandon, sed montriĝis, ke restis kelkaj nevenkeblaj kontraŭaĵoj, speciale en rilato kun la internacia fervoja trafiko. En la plej nova eldono la problemo estas traktata sur la internacia bazo de la geografia unueco de Eŭropo,okcidente de la fera kurteno. Studo de la momentoj de sunleviĝo kaj sunsubiro en la koncernaj landoj kondukis al la plej konvena unuo de la taga tempŝanĝo de 50 sekundoj. Tiel la tuta Eŭropo povos havi unu saman temposistemon kaj ĝui la profitojn de la "pli longaj tagoj" dum granda parto de la jaro (kompreneble ne dum la vintro!). Ĉar la profesoro ne povis ŝanĝi la efektivan longecon de la tagoj, li devis kontentigi sin per forpreno de la malkongruo inter la astronomia tago kaj la socia tago. Li atingis



Mag. d-ro G. VAN DEN BERGH

tion ŝovante la socian tagon (inter ellitiĝo kaj enlitiĝo) ĝuste tiom, ke ĝi laŭeble plej bone egaliĝas kun la tago de la suno. La Kolumba ovo, necesa por tiu atingo, estas la bagatela teknika artifikaĵo: ŝanĝi la longecon de la sekundoj: en unu duono de la jaro ili estu

iom pli mallongaj ol nun, en la alia duono iom pli longaj.

La profitoj estos gravegaj, la malprofitoj sensignifaj kompare kun la avantaĝoj. Unue: la taga laboro kaj la lerneja instruado ŝoviĝos al pli fruaj horoj ol la nuna horloĝ-indiko; laŭ la nova tempindiko tamen tiuj okupoj estos preskaŭ ligitaj al la sunleviĝo. La sekvo estos, ke la liberaj horoj pli kaj pli falos antaŭ la sunsubiron, ju pli ni proksimiĝos al la mezo de la somero. Oni pli ol nun povos pasigi ilin eksterdome por sporti aŭ por ĝui la naturon.

La favora influo de la iom malpli alta temperaturo sur la industrian produktadon estas evidenta; prof. van den Bergh kalkulas la gajnon en la industrio (sen tiuj industrioj, kie oni dum la plena tagnokto laboras) por la tuta Eŭropo je 150 milionoj da dolaroj! La ŝparo en la lumigado sekve de la nova horloĝindiko povos esti 4 milionoj da dolaroj. Ne ĉiuj profitoj estas kalkuleblaj, ekzemple ne la favora influo al la korpa kaj psika sanstato de la eŭropa loĝantaro. Pli da suno ja signifas pli da rezisto kontraŭ infektaj malsanoj. Pli multa distro en la kamparo refreŝigas la menson. La foresto de subitaj temposaltoj, tiel ĝenaj por la agrikulturistoj, kaŭzas, ke okupoj dependaj de la suna tago (melkado, legomrikoltado,ktp.) estas daŭre kaj bone adaptitaj al la socia tago. La profesoro antaŭvidas, ke ankaŭ la trafik-akcidentoj malplimultiĝos, pro la fakto, ke ankaŭ la trafiko pli okazos dum la sunlumado. Kiom da homaj vivoj tiel estos savitaj, estas malfacile taksi.

Mi ne volas trakti ĉiujn aspektojn detale; oni povas trovi pli da informoj en la libro. Ili pruvas, ke la profesoro ne fantazias aŭ konstruas revkastelojn. La populara sed solida astronomia enkonduko kaj la rezultoj de liaj konsultoj kun statistikistoj, ekonomoj, agronomoj kaj aliaj specialistoj vekas plenan fidon, ke la simpla horloĝa manipuleto nepre ĵetos en niajn brakojn grandajn profitojn, verŝajne pli grandajn ol la aŭtoro per siaj modestaj taksadoj montras. Por dudek eŭropaj urboj tabeloj estas aldonitaj kun la horoj de sunleviĝo kaj sunsubiro laŭ la nuna kaj la proponata sistemo.

Por enkonduki la "Eŭro-horloĝon", internacia interkonsento de la eŭropaj registaroj estas necesa. En Nederlando ŝtata komisiono jam okupis sin pri la unua, la nacia propono. Por atingi la koncernajn instancojn la libro devos esti tradukita en plurajn eŭropajn lingvojn Certe Esperanto povos ĉe tio servi kiel pontlingvo. La tradukoj povus fariĝi eĉ pli konvinkaj, ol la nederlanda eldono, se ripetoj en la teksto estos forstrekitaj.

Por akceli la enkondukon de la Eŭrohorloĝo, oni fondis en Amsterdamo asocion, kies tasko estas propagandi la ideon en ĉiuj landoj de Eŭropo. Ke la afero estas tre serioza kaj ke ĝi baldaŭ okupos la registarojn kaj la parlamentanojn de la eŭropaj landoj, tio atestas la fakto, ke la ĝenerala estraro de la nova asocio formiĝis el gvidantaj personoj en la nederlanda politika, kultura kaj ekonomia vivo. ...

...Inter la unuaj decidoj de la nova asocio estas la eldonado de kvarlingva (france, angle, germane kaj itale) libro pri la temo. Tiu libro estos transdonata al ĉiu membro de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo.

G.F. MAKKINK

(Artikolo aperinta en "La Praktiko", junio 1958)

****

"Ĉu ni rajtas paraleligi tiun proponon kun tiu pri Esperanto? En 1958 la projekto "Eŭro-horloĝo" aspektis serioza al gravuloj. Sed poste? Ĉu ĝi estis diskutata kaj taksita "neserioza" aŭ tutsimple metita sub "pli gravaj" dosieroj, funde de iu tirkesto? Sperto de aliaj utilu al la esperantistoj!"

Universalismo en la Revolucio de 1789 (I)

Kiel tion indikas la titolo, tiu prelego pritraktos ĉefe pri universalismo, kaj ĉar la francoj memorfestas ĉi tiun jaron la ducentjaraĝon de la eventoj de 1789, ŝajnis al mi oportune montri, kiel tiuj eventoj kontribuis al la diskonigo en Eŭropo de tiu universalisma idealo.

Mi opinias, ke por forigi ĉiun miskomprenon, preferindas precizigi ekde la komenco la signifojn de la konceptoj, kiujn mi uzos poste. Laŭ filozofia difino, universalismo estas strebo al universala karaktero de la institucioj, de la kutimoj, de la moroj kaj pli ĝenerale de la idealoj. Sed mi konstatis, en 1989, pro maltoleremaj okazaĵoj, ke ekzistas diversaj universalismoj. Por skeme esprimi la situacion, mi opozicios la dogmemajn universalismojn, kiuj celas trudi al la tuta mondo la saman striktan mondkoncepton, al la liberala universalismo, kiu celas liberigi la homojn de la dogmoj, kiuj fakte dividas ilin en rivalajn grupojn, ĉiam militantajn unu kontraŭ la aliaj. En tiu prelego temos nur pri tiu liberala universalismo.

La elekto de 1789 en la titolo unuflanke estas pravigita de la nuna jaro, sed krome ĝi substrekas la fakton, ke mi ne aludos pri la franca revolucio (kiu daŭris, laŭ freŝdata libro de 1776 ĝis 1880), sed de ĉiuj eventoj ne nur francaj, kiuj okazis ĉirkaŭ 1789 kaj celis la saman universalismon en la okcidenta mondo.

LA KARAKTEROJ DE UNIVERSALISMO-

La genezo de universalismo- Mi ne pretendas prezenti kompletan historion de universalismo, sed montri,kiel tiu idealo iom post iom eniris la penso-sistemojn de la homaro. Ŝajnas, ke, je la naskiĝo de ĉiu homa socio, unue ekzistis konkurencaj grupoj. Post la studoj de la etnologoj de la 19-a jarcento oni nomis "klanoj" tiujn grupojn, kies ligo estis totemo ligita kun mitoj kaj religiaj ritoj kaj tabuoj. En la landoj, kie ekzistis skribaj civilizacioj, oni trovas, en la komenco de la skribita historio, iujn grupojn, kiuj tre similas al la klanoj ĉi supre aluditaj. Kie poste estis gravaj imperioj, estis en la pli fruaj tempoj, iuj grupoj apartigitaj de siaj lingvoj kaj religioj kaj tiuj grupoj estos poste arigitaj per bataloj. Ofte sed ne ĉiam la venkintoj trudis al la venkitoj siajn diojn, kaj siajn morojn. En aliaj okazoj la venkintoj adoptis la religion de la venkitoj,kaj en ankoraŭ aliaj cirkonstancoj, la venkintoj akceptis ĉiujn diojn en la imperio, ĉar la unuiĝo ne plu estis religia sed politika.

Samtempe, same kiel la popoloj estis unuigitaj, la diversaj dioj kelkfoje specialiĝis, kaj la politeismo, kiu antaŭe estis genta, evoluis al pli malpli kohera diaro, kies ekzemplo plej konata estas la greka.

Kiam oni parolas pri universalismo oni povas opinii, ke nur monoteismo povas krei tiun sintenon. Sed la juda ekzemplo montras, ke la ekzisto de nur unu dio ne estas kondukilo al unuiĝo de la homaro. Fakte, en la tiel nomata "malnova testamento" la unika Dio ne estis la dio de ĉiuj homoj, sed tiu de la nuraj Hebreoj. Kaj dum jarcentoj, tiuj Hebreoj batalis, kun la helpo de sia propra dio, kontraŭ la aliaj homoj kaj aliaj "falsaj" dioj. Cetere la judoj sukcesis kredigi, ke la kreinto de ĉiuj homoj, fariĝis la helpanto de nur la "elektita popolo" pro la pekoj de la aliaj homoj kaj tiel pravigi la kunekziston de la unika dio, kun la tradicia "totema" kutimo. Per tiu "alianco" inter Dio kaj Israelo la juda Dio ne plu estas universala dio sed historia dio.

Universalismo naskiĝas ekstere de la religiaj kaj politikaj institucioj, kiuj rifuzas ĝin. La plej malnova okazaĵo pri tia sinteno estas tiu

de Akenato en la 14-a jarcento antaŭ Kristo. Tiu faraono, kies povo estis tre limigita de la pastraro de la Teba dio Amono, decidis ŝanĝi la religion. Li unue ŝanĝis sian nomon "Amenotep" (Amono estas kontenta) en "Akatenon" (Tiu, kiu plaĉas al la suna disko); due li forlasis la urbon Tebo por konstrui tute novan urbon, kaj ĉefe li instruis, ke ĉiuj homoj estas filoj de la sama unika dio, kiu estas la suna disko. Kiam mortis tiu faraono, la pastraro de Tebo retrovis la povon kun la filo de "Akenaton", la bone konata "Tutankamon" (kies vivo similas al Amono) kaj nuligis ĉiujn reformojn, detruis la urbon, k.t.p. La tradicia religio rifuzis universalismon.

Alia epoko, tiu de la grekaj filozofoj. Tiuj homoj serĉas klarigojn pri la mondo, ekstere de la tradiciaj mitoj. La teorioj de tiuj homoj valoris por la tuta homaro (ekzemple la kaverna mito de Platono rilatas al ĉiuj homoj kaj ne al iu speciala popolo). Sed tiu filozofia universalismo havis nenian politikan efikon.

Kiam Aleksandro konkeris imperion, la tiamaj filozofoj, la stoikistoj, prezentis universalan filozofion (ĉirkaŭ -308 de Zenono el Citiono) (oni ne konfuzu kun Zenono el Elajo). La disĉiploj intencis starigi iun "civiton de la ĉielo" (Uranopolis) en la duoninsulo, kie nun estas la monaĥejoj de la monto Athos. Sed la imperio de Aleksandro disfalis kaj la homoj restis dividitaj. Stoikismo restos, kiel moralo ĝis la fama imperiestro Marko-Aŭrelio (121-180), sed tiam venis alia religio.

Kristanismo estas deorigine tutmonda religio, kontraŭe al Judismo. Cetere la greka vorto "katolikos" signifas universala. Sed la religio de Kristo disvastiĝis en la Romia imperio, kie ekzistis alia formo de universalismo. Pro la militoj, la imperiestroj de Romo konstruis perforte iun aron da popoloj, sed la homoj en la imperio ne estis egalaj, frataj. Estis la sklavoj (eksmilitkaptitoj), sed eĉ la liberaj homoj havis diversajn statusojn. Nur en 212 la imperiestro Caracalla donis al ĉiuj popoloj la romian civitanecon. En tiu imperio, la kristanoj unue restis ekstere de la politiko, laŭ la fama distingo "redonu al Cezaro la proprajon de Cezaro kaj al Dio la proprajon de Dio" (citajo de la Nova Testamento). Tiam la religio estis universala, sed sen politika povo; post Konstanteno (313) ĝi akiris politikan povon, sed tiam, pro imito de la imperiaj hierarkioj, ĝi ne plu estis universala. Cetere, kiam la imperio fariĝis entute kristana (malpermeso de paganismo fare de Teodozio en 391) ĝi baldaŭ disfalis en Okcidento. Odoakro en 476 nuligas la okcidentan parton de la Imperio.

La disfalo de la romia imperio en okcidenta Eŭropo kondukis al feŭdismo, kiu estas socia dispecigo, kie pli kaj pli multiĝas la apartaj lokaj aranĝoj. Nur la kristana religio kun la uzo de la latina lingvo restas ligo inter la diversaj popoloj, kie la gentoj intermiksiĝas kaj la diversaj dialektoj apartiĝas. La nura universalismo, kiu estas tiam tute ne politika, estas la atendo de la reveno de Kristo.

LA APERO DE UNIVERSALISMO EN LA MODERNA HISTORIO-

La fontoj: malkovro de Ameriko. Tra la Renesanco, kun la remalkovro de la antikvaj memorajoj kaj ankaŭ, kaj precipe, pro la malkovro de Ameriko, kies suda parto estas prirabata de la Hispanoj reaperas politika kaj socia universalismo. La malkovro de Ameriko starigas problemon por la Eŭropanoj. Sed ekde 1494 la papo jam dividis la novan kontinenton en orienta parto por Portugaloj kaj okcidenta parto por Hispanoj; nur poste, en 1537, la tiama Papo "Paŭlo la tria", oficiale agnoskas (buleo "Sublimus Deus" la 9-an de junio 1537) ke la indiĝenoj de la orientaj kaj okcidentaj "Indoj" estas homoj. Kelkaj katolikoj (Las Casas 1542) malaprobas la konduton de la konkerantoj, sed la aŭtoritatoj tion ne akceptas, kaj Las Casas devas reveni al Hispanio en 1547.

La religia fluo. La religiaj utopioj. En tiu epoko, oni povas distingi

en universalismo du fluojn. La unua estas religia kaj revas pri "Dia civito sur la tero". La katoliko latine nomata Thomas Morus verkis "Utopion" en 1516, sed estis mortigita de la reĝo Henriko la 8-a en 1535. Alia katoliko, la dominikano Tomaso Campanella verkis la "Civito de Suno", partoprenis komploton kontraŭ la privilegioj de la nobeloj, kaj pro tio restadis 27 jarojn en karcero antaŭ ol trovi rifuĝon en Francio, kie li mortis en 1639. La protestanto (Morava eklezio) latine nomata Comenius famiĝis pri sia pedagogio sed ankaŭ pri siaj ideoj pri federacio de popoloj; li fine trovis rifuĝon en Nederlando, kie li mortis .

La liberala fluo. Humanisma bazo.

La katolika reformo, tra la koncilioj en Trento (1545-1563) enradikigas la katolikan eklezion en la dogmismon kaj pro tio nur la nekatolikoj daŭrigas sur la vojo al liberala universalismo. Tiam la homoj forlasas la Dian regnon de la kristanoj, por anstataŭigi ĝin per reveno al la "Cosmopolis" de la stoikistoj, kie la rajtoj de la homo baziĝas nur sur la homo mem, ne aludante pri la diversaj religioj.

Tio komenciĝas kun Kartezio (Diskurso pri la metodo 1637), kie, for de la mezepoka tradicia filozofio, la bazo de la filozofio estas la homaj konscio kaj racio sendepende de la politikaj kaj religiaj sistemoj. Ankaŭ la latine nomata "Grotius" (1583-1645), kiu estas nederlanda protestanto, skribis en sia verko pri internacia juro "De jure belli ac pacis":"La natura leĝo konservus sian valoron eĉ se Dio ne ekzistus". Poste Locke (1632-1704), kiu fuĝis al Nederlando antaŭ ol reveni al Anglio nur post la eventoj de 1688, verkis "Leteron pri toleremo" en 1689 kaj "Traktato pri la civila rego" en 1690; laŭ tiu libro: la socia kontrakto ne malaperigas la naturan rajton de la individuoj. Oni povas rimarki, ke tiuj tri cititaj homoj devis fuĝi el sia lando por trovi rifuĝon en aliaj landoj same kiel la religiemaj tutmondistoj jam cititaj. La naciaj registaroj rifuzis la evoluon al tutmondaj naturaj rajtoj de la homo.

La jarcento de la lumoj. Dum la 18-a jarcento tiu fluo pri liberala universalismo daŭris kun Montesquieu, Diderot, Voltaire, d'Alembert, Rousseau, Helvetius,d'Holbach. Kio ligas homojn, kiuj venas de diversaj religioj (Helvetius kaj Holbach estas ateistoj, Rousseau edukiĝis protestanto, la aliaj principe estis katolikoj) tio estas la rifuzo de dogmismo; ili montras la liberalan universalismon. Iliaj verkoj aplikas la sciencan eksperimentan metodon, kiu akceptas reekzameni la tradiciajn opiniojn. Montesquieu, en la "Spirito de la leĝoj" kompare studas la diversajn ekzistintajn politikajn leĝarojn, dum Rousseau en "La socia kontrakto" opozicias al la nuna socio iun idealan mondon konstruitan laŭ la kriterioj de lia filozofio.

La tiel nomataj "prilumitaj despotoj", kiuj dezirante apliki tiujn principojn regis por la bono de siaj popoloj laŭ la principoj de la natura rajto nepre devis halti survoje, ĉar la obeo al la nura racio senutiligas la despoton.


Estas interese noti, ke en tiu fino de la 18-a jarcento Francio estas la lando de Eŭropo, kie la homoj estas plej multe nombraj, ke ekde la tempo de Ludoviko la 14-a, la eŭropaj elituloj scipovas la francan lingvon kaj interesiĝas pri la franca literaturo. Ĉar la politika povo de Francio ne ŝatas la kritikojn, la propagandistoj de tiuj novaj ideoj vojaĝas tra Eŭropo, kaj tia sinteno povas nur plifortigi la ideon, aliparte bazitan sur la pensmetodo, ke tiuj ideoj tiel proponataj estas universalaj.

Fernand BOYET

El prelego farita en Gresillon en oktobro 1989 (1-a parto)

PAĜO DE LA GEKNABOJ

Estas la 5-a de novembro kaj mi, la unuan fojon en 16 jaroj, denove ĉeestas la "nacian feston" de Anglio; tre modeste: tra fenestro mi rigardas la genepojn kun amikoj ĉirkaŭ fajreto en la ĝardeno. Patroj prizorgas la piroteknikaĵojn kaj patrinoj disdonas "varmajn hundojn" kaj bakitajn terpomojn. En miloj da publikaj parkoj kaj privataj ĝardenoj tra tuta Anglio, ĉi-vespere flamas fajregoj, fajroj, fajretoj kaj kolore eksplodas piroteknikaĵoj Ĉirkaŭe infanoj, junuloj, plenkreskuloj gaje ludas aŭ babilas kaj manĝas "varmajn hundojn" (Ne timu, la angloj ne manĝas siajn preferatajn dombestojn! La manĝataj "hundoj" estas kolbasoj en panbuloj, spicitaj per cepoj kaj saŭco aŭ mustardo.) Je la supro de la fajregoj homfiguro el pajlo, vestita laŭ modo antaŭ 400-jara, atendas la flamojn, kiuj grimpas rapide alten, eklekas ĝiajn botojn, manĝegas ĝian pantalonon, ĝian mantelon kaj fine englutas tute la pajlopupegon. La festanta amaso ĝojkrie hura-as je la finbruligo de la homfiguro, kaj turnas sian atenton al la piroteknikaĵoj.



La angla Parlamentejo en 1605

La bruligo de homfiguro estas plej grava parto de la festo. Tiu homfiguro reprezentas viron nomitan Guy Fawkes (gaj foks), kaj havas mem la nomon "la gaj". Guy Fawkes vivis antaŭ 400 jaroj kaj estis membro de bando, kiu planis eksplodigi la parlamentejon je la 5-a de novembro 1605 en la horo, kiam ĉiuj parlamentanoj, kaj ankaŭ la reĝo, ĉeestos la oficialan malfermon de la parlamento. La bando stokis pulvon, sekrete, en la kelo sub la parlamentejo dum pluraj tagoj antaŭ la eksplodigo-tago. La nokton de la 4-a de novembro, Guy Fawkes kaŝis sin inter la pulvobareloj kaj atendis la horon fajrigi la pulvon. Ekstere estis ege malvarme kaj la parlamentejogardantaj soldatoj frostis. Oficiro sendis soldaton en la kelon por trovi lignon, per kiu fari fajron. Je sia miro la soldato trovis ne nur lignon, sed homon! Tiel malkovriĝis la murdo-plano de la perfiduloj. La reĝo estis tiel kolera, ke li ordonis, ke la angloj neniam forgesu la daton de tiu okazaĵo.

AUDREY



KULTURAJ KAJEROJ


deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn tagojn dum la venonta jaro.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	M	A	L	F	E	L	I	Ĉ	D
2	A	N	O	▨	R	A	D	A	R
3	T	I	G	R	O	▨	D	P	E
4	E	M	A	▨	T	U	J	E	▨
5	R	O	▨	K	I	U	▨	L	A
6	I	▨	B	U	K	▨	P	O	M
7	A	K	U	R	A	T	E	▨	▨
8	L	A	S	U	▨	O	C	I	M
9	O	V	E	▨	A	F	O	N	I

NOVA ENIGMO



Horizontale: A- LA UNUA KAŜITA PROVERBO- B. Luksaj fortigitaj domegoj - la plej malgranda materiero - interjekcio de subita falo- C. Finaĵo de volitivo- granda batal' per armiloj - gajniga koloro en kartludoj - rilata al korneca birdbuŝo- Ĉ. Landa Sekcio - purig' per akvo - vidorgano - intermontaj terpartoj D. Duopoj - postsigno - homa korpo-part' - nomo de la litero J- E. flankaj partoj de konstruaĵo - tro ŝparema - konsumas cigaredon - aŭtosimbolo de Rumanujo- F. pozici' de surseĝa homo - rilata al aŭdorgano - eco mezurata per takimetro- G. LA DUA KAŜITA PROVERBO.

Vertikale: 1- estas puninda pro malbonfaro. 2- Serpento el la "Libro pri ĝangalo" - foliarb' kreskanta en malseka tero. 3- Sufikso - ronĝi. 4- profitaj efikoj - ampero. 5- vekantaj agrablan vidplezuron - finaĵo de la futuro. 6- manĝebla oleoriĉa frukt' - grupo. 7- naŭa liter' de la greka alfabeto- - perd' de konscio. 8- Interjekcio - laktoblanka juvelŝtono. 9- Kemia simbolo- preciztempa (rad.).10- neartefarita - verba finaĵo. 11- malgrandulo - kemia simbolo. 12- Devizo - fare de. 13- mezurunuo - apartigita vagonpart'. 14- nomo de la litero R - elĵetis trabuŝe stomakenhavon. 15- delegito - speco de poemo. 16- Insekt' - prepozicio. 17- likvaĵoj en fruktoj - kemia simbolo. 18- supera oficiro.

LA VIVO EN GRESILLON

Komitat-kunveno - Dimanĉon la 22-an de oktobro 1989

Ĉeestas la kunvenon: D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, S. Bourot, P. Chevalier, G. Dairon, G. Lagrange, R. Lenel, P. Mêtivier, J. Vincent. Senkulpiĝis: Y. Bodereau, F. Le Magadure, R. Lloancy.

Staĝoj 1989- Estis registritaj entute 3288 tranoktadoj; tiu nombro estas 3% pli alta ol la antaŭan jaron. 364 personoj aliĝis. Sed la meza ĉeesto-daŭro restas mallonga: 9 tranoktadoj. Nur 30% ĉeestis kompletan staĝon. Pli kaj pli da junaj familioj vizitas la Esperanto-Domon; tial la meza aĝo de la ĉeestantoj malaltiĝas. La procento de eksterlandaj partoprenantoj restas la sama: 48%. La financa raporto provizora montras, ke normale kreskis la enspezoj kaj elspezoj koncernantaj la restadojn. Multe kreskis la vendado de libroj kaj butikaĵoj.

Dum julio entute 66 personoj partoprenis la unuan staĝon. La kursoj kaj prelegoj estis sukcesaj kaj ariqis fidelan ĉeestantaron. Ekskurso "ilustris" la temon de la prelegserio: la Franca revolucio. La partoprenantoj multe ŝatis ĝin. Ĉeestantoj esprimis sian bedaŭron, ke ne ĉiuj prelegantoj povas resti dum la tuta staĝo; okazas, ke nur unu-du tagojn kelkaj restadas. Tio, aldonita al la fluktuado de la ĉeestantaro, iom bremsas la unuecon de la staĝoj. Dum la dua staĝo ĉeestis tuta grupo de la organizo JEAN dum unu semajno.

Dum aŭgusto la nombro da staĝanoj ŝanĝiĝis ĉiutage. Tiu fenomeno, nun ofta, ĝenas la administradon de la staĝoj kaj ankaŭ, eĉ pli, la disvolviĝon de la kursoj, precipe de la unua-nivela.

Du asocioj de artistoj petis la disponon de la teretaĝaj salonoj por organizi ekspozicion de pentraĵoj, skulptaĵoj kaj fotoj, de la 29-a de oktobro ĝis la 5-a de novembro. La Esperanto-Domo nur disponigas la lokojn, kontraŭ pago.

Staĝoj 1990- La kalendaro de la staĝoj por 1990 estis starigita dum la komitat-kunveno de la 2-a de julio. Henri Boyet jam kontaktis eventualajn kursgvidontojn kaj prelegontojn. Li atendas la respondojn. G. Lagrange estas preta gvidi kurson pri tradukado dum la lasta semajno de julio 1990. S-ino Bloch proponis gvidi, sine de alia staĝo (ekzemple en aŭgusto) kurson pri "sano". Suzanne Bourot diras, ke instruistino de la departemento Tarn ŝatus veni kun gelernantoj al Grésillon por viziti la regionon. S. Bourot plu informos la komitaton. Renée Lenel administros staĝon en julio. Luce kaj Pierre Babin administros la staĝon de junio kaj la lastan en aŭgusto. Neniu alia sin proponas por la aliaj staĝoj.

La komitato decidas altigi la restad-tarifojn je 3%.

Propono estis farita por pligrandigi la ŝrankojn de la biblioteko. Sed la antaŭfakturo montras, ke tiu pligrandigo estus tre multe kosta. G. Dairon proponas donaci ŝrankon. Restas la problemo de la transportado. La antaŭ-fakturoj de la farbisto kaj de la elektrikisto koncerne la refaron de la biblioteko kaj de la oficejo estas akceptitaj. La grandaj ŝutroj de la kurso-ĉambroj estos riparitaj. Ankaŭ la ĉefa enirpordo de la kastelo. Se eblas la dratreto de la tenisejo estos refarita.

S-ino Vincent diras, ke 15 lernantoj aliĝis al la perkorespondaj

kursoj. Sed la materialo postulas kelkajn ŝanĝojn. La programita kurso de La Chaux-de-Fonds estos studata por eventuala uzado. Koncerne la tria-gradan kurson, s-ro Fernand Boyet jam studis ĝin kaj faris proponojn. Li konsentas plustudi ĝin kaj fari pliajn proponojn.

La komitato decidas, ke la Ĝenerala Kunveno okazos sabaton la 21-an de aprilo 1990 posttagmeze. La komitatanoj kunvenos dimanĉon la 22-an de aprilo. La unua punkto de la tagordo estos la elekto de nova estraro, sekve de la laŭstatuta ŝanĝo de duono de la komitato. Espereble kandidatiĝos amikoj pretaj efektive partopreni en la gvidado de la Esperanto-Domo.

Informita de la nuna malbona sanstato de Audrey Childs-Mee, la komitato deziras al ŝi rapidan resaniĝon kaj sendas al ŝi siajn plej elkorajn salutojn.

La kunveno finiĝas je la 16-a horo.

La sekretario: Guy Dairon

****

Ni Funebras

La 19-an de oktobro mortis Ellen EGGERS de Hamburgo. Jam de multaj jaroj ŝi vizitis Gresillon dum la someraj aranĝoj. Ĉiuj ŝiaj amikoj ankoraŭ longtempe memoros ŝian afablecon. Kara amikino de ĉiuj ŝi estis. Ni prezentas al ŝia familio, al ŝiaj samklubanoj en Hamburgo niajn amikajn kondolencojn.

****

LIBRO-SERVO

Okaze de la Nova Jaro, pensu pri viaj korespondantoj loĝantaj en malriĉaj landoj. Donacu al ili la esperanto-libron al kiu ili sopiras, kaj kiun ili ne povas trovi en siaj malplenaj libro-servoj. Malavare helpu ilin. Vi certe trovos en nia katalogo la "raran perlon" de la Esperanto-literaturo, kiu eble mankaŝ ankaŭ al vi.

Petu la novajn katalogojn, t.e. unu por la novaj libroj, alia por la brokantaĵoj, de:

S-ino J. VINCENT, 26bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE
Tel. 41 89 29 47.

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

Petu informojn pri niaj perkorespondaj kursoj: 1-a nivela kurso: 150 f.; 2-a nivela kurso: 150 f.; 3-a nivela kurso: 100 f.

ĈU vi pagis vian abonon?

SENDU BANKĈEKON al Bábin 13 bd Chauvinière 44300 Nantes

POŜTĈEKKONTO: Nantes 2 813 61 L

NIA KONKURSO

SOLVO DE LA ANTAŬAJ ENIGMOJ

1 — La trovotaj vortoj estis : ĉokolado, reŭmatismo, arkeologio, filantropo, frugilego, halebardo, substantivo, insulti, fanfaroni, sencĉese, elegante.

La pripensinda opinio : Voli feliĉigi la tutan mondon estas belega afero, sed ankoraŭ pli bela afero estas feliĉigi unu homon.

2 — La trovotaj vortoj estis : eksa, suda, taso, algo, sapo, doto, alko, nuda, ĝibo, erco, ruĝo, elfo, edzo, suko, togo, inko, balo, orfo, nevo, aldo, huzo, okro, mono, orlo.

La frazo de G.B. Shaw estas : Estas danĝere esti bona homo.

La gajnintoj estas :

Roger MOTTO, Avignon, 200 frankojn.
Simone HUMM, Avignon, 150 frankojn.
Suzanne AUTHIER, Beziers, 100 frankojn.
Ge.sroj HUBERDEAU, Le Mans, 50 frankojn.

NOVA KONKURSO (premiita)

1-a enigmo : La maljuna panjo Doroteo en la vilaĝo Kotangul, vidvino de la pie mortinta botisto Georgo Glupland, estas ege bonkora virino. Ŝi estas imitinda ekzemplo por ĉiuj aliaj virinoj, kaj eĉ por viroj. Jen tipa ekzemplo el ŝiaj famkonataj kaj en la vilaĝaj babilrondoj senĉese pritraktataj bonfaroj :

Panjo Doroteo antaŭ kelka tempo vizitis la foiron en la najbara urbeto Klaĉnest, kaj por subteni la Universalan Ligon de la Kokinbredistaro de Klaĉnest kaj Regiono, ŝi aĉetis tie ĉiujn ovojn, kiujn la diligenta vendistaro de la meritplena Ligo ne sukcesis forvendi. Irante hejmen, panjo Doroteo renkontis sur la vojo almozulinon, malriĉegan, malfefiĉegan virinon, patrinon de tri orfaj infanetoj. Ŝia bona koro tiel forte moviĝis, ke ŝi tuj donacis al la kompatindulino la duonon de la aĉetitaj ovoj plus unu duonan ovon.

Malpeziginte per ĉi tiu bonfaro siajn animon kaj korbon, panjo Doroteo daŭrigis la marŝadon. Sed baldaŭ ŝi renkontis alian almozulinon, malfeliĉegan patrinon de ses orfaj infanetoj. Ne povante bremsi sian kompatemon, ŝi donacis al la almozulino la duonon de siaj restintaj ovoj, plus unu duon-ovon. Post duonhora marŝado ŝi renkontis trian almozulinon, mizeregan patrinon de naŭ orfaj infanetoj. La bona panjo Doroteo denove ekzercis sian faman virton, donacante al la almozulino la duonon de la restintaj ovoj, plus duonan ovon.

Feliĉe la hejmo de panjo Doroteo estis jam proksima, kaj tial ŝi ne havis plu ŝancon renkonti kvaran almozulinon por povi donaci siajn lastajn kvin ovojn. Do ŝi kuiris el ili bongustan omleton por siaj fidelaj kunuloj : la blanka hundo Svingisvangivostorel kaj la nigra kato Dirmidormišnurimuri. Sendube multaj gelegantoj de nia revuo rapidos imiti ĉi tiun klasikan bonfaron kaj tial urĝe bezonas scii, kiom da ovoj aĉetis panjo Doroteo, kaj kiom ŝi donacis al la tri infanetriĉaj malriĉulinoj. Ili solvu tiun problemon !

2-a enigmo : Ni promenu en bela arbaro, kiu konsistas el la jenaj arboj :

PRUNELARBETOJ
JUNIPERARBOJ
SIRINGARBETOJ
FRAKSENOJ
KVERKOJ

En tiu arbaro kaŝiĝas bestoj. Serĉu ilin ŝovadante la arbojn dekstren kaj maldekstren ! La bestoj aperos en la vertikalaj literkolonoj, nomoj legeblaj de supre kaj de malsupre. (Aperinta en La Praktiko (nº 1-1946)).

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10ᵉ-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 21 Rama Crescent Khandallah - Wellington 4 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — Nº C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN